


# tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo  
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

aprilo 2007  
n-ro 94



- ★ Lernantino Tena Kuzmanović filmis TV-serion pri Esperanto
- ★ Bengala *Hlapic* lanĉita en Kolkato
- ★ Esperanto en Rijeka festos sian centan jubileon
- ★ *Hlapic* tradukita en la vjetnaman
- ★ SEK preparas sian 50-an jubileon en 2007

## Karaj legantoj!

La jaron 2007 ni komencis per TV-serieto pri Esperanto kiu ekde la 5-a de januaro gvidis lernantino de elementa lernejo Retkovec Tena Kuzmanović. Ŝi dum sep matenoj dum daŭro de kelkaj minutoj rakontis al TV-publiko pri Esperanto kaj la Esperanta gramatiko. Jen unikaĵo kian ni antaŭe ankoraŭ ne spertis kaj kiun ni ŝuldas al entreprenemo de Judita Rey Hudeček. Ni ekinstruis en tri kursoj kiujn la apero de Tena sur la ekranoj de HTV havigis al ni. La TV-kurso estis nur unu speco en la tuta ĉeno da informoj pri Esperanto kiujn ni disdonis en la lastaj semajnoj. Al Esperanto en kroataj amaskomunikiloj rilatas nia enkondukita artikolo.

En Rijeka okazas viglaj preparlaboroj por festi la centan jubileon de la unua Esperanto-asocio en Rijeka. Al la granda jubileo en novembro en Rijeka bonvenas ĉiuj kroataj esperantistoj. Unu fojon en la vivo oni havas 100 jarojn. Sed la preparlaboroj ne malhelpas ke esperantistoj el Rijeka karnavalu kaj kontribuu al la laboro de la alia najbara cent-jarulo la Esperanto-Societo en Triesto.

Ankaŭ Studenta Esperanto-Klubo proksimas al sia duonjarcenta jubileo. Ĝia ĉefprogramo planatas por la jarfino de 2007. Ankaŭ Kroata Esperanto-Ligo ne malproksimas de sia centa jubileo, festota en 2008.

Sed ni ne nur jubileas. Pri Esperanto science okupiĝas sciencisto Velimir Piškorec kaj instruistoj pri Esperanto agas en sia fako kiel leĝblos sur la postaj paĝoj, ne nur en rubriko „Ni instruas“. Gejunuloj siavice kontribuas: Tina Tišljar estis unu el 12 plej bonaj gejunuloj kiuj gajnis premion por siaj imagoj pri Eŭropa Unio, okaze de la malfermo de Oficejo de EU en Zagrebo.

Internacia kunlaboro per Esperanto estas grava parto de nia laboro: Niaj kolegoj en la barata mondo helpis organizi lanĉon de la bengala traduko de *Mirindaj aventuroj de Hlapić*. Nia barata kunlaborantino Mina Dan raportas pri la februara evento en Nehrua muzeo en Kolkato en kiu ne mankis ambasadoro de Kroatio en Hinda Unio Dino Debeljuh. Lige al tiu tago Urba biblioteko en Velika Gorica gastigis la bengalan *Hlapić* kaj la infana publiko ne nur aŭdis la informojn pri la bengala de Ivan Andrijanić, profesoro ĉe hindologio en Filozofia fakultato kaj aŭskultis la fragmenton el la bengala traduko sed ankaŭ gustumis la bengalan "alukablon" preparita de Sulehka Pollak.

Belan surprizon faris por ni niaj kunlaborantoj en Vjetnamio: la entreprenema vjetnama teamo kreis vjetnaman tradukon de *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* kaj nun serĉas eldoniston. Kiuj ili estas – bv. legi en la koncerna artikolo.

Niaj kolegoj en Israelo

sukcesis eldoni poŝtmarkon honore al Zamenhof, kiun ni kun plezuro prezentas al vi.

Sisak klopodas revivigi sian Esperantan komunumon.

En aprilo ni planas kulturalan programon en Zamenhof-Strato la 13-an de aprilo por omaĝi al la viktimoj de holokaŭsto. En majo Esperanto-Domo Kostrena akceptas lernantojn kaj instruistojn pri la programo *Pokalo Kostrena*. Verkisto Igor Mandić akceptis renkontiĝi kun ni majfine.

Poste baldaŭ eksomeros. Nia kalendaro dorsflanke ne proponas nur la aziajn eventojn Hanojon kaj Jokohamon. En Esperantujo ĉiam okazas io.

Ne forgesu rigardi la liston de subtenoj por nia estonta ejo en Vodnikova! Ni eniris la kvinan jaron de repagado de nia loĝeja kredito. Dankon pro via solidareca helpo.

S. Ŝtimec

**Dekstre:**

Israela  
Esperanta  
poŝtmarko



Kroata komponistino Sanja Drakulić kore dankas al japanaj helpantoj kaj japanaj esperantistoj kiuj helpis al ŝi okaze de la restado en Japanio.

**Tempo**

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXVI, numero 94 (1/2007), ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Ministerio de Kulturo de Respubliko Kroatio.

**Redakcio:** Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio, **tel:** (385 1) 4617550, **fakso** (385 1) 4619373, **rete:** [esperanto@zg.t-com.hr](mailto:esperanto@zg.t-com.hr), [www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr) - **Kontribuis:** Boris Di Costanzo, Zoran Ćirić, Mina Dan, Ana Galeković, Jelka Glumičić, Emil Hrvatin, Tom Juval, Davor Klobučar, Tena Kuzmanović, Nguyen Xuan Thu, Vjekoslav Morankić, Josip Pleadin, Velimir Piškorec, Probal Dašgupta, Spomenka Ŝtimec, Dag Treer, Blazio Wacha. **Redaktis:** Spomenka Ŝtimec, **Grafike aranĝis:** Josip Pleadin. **Presis:** Grafokom, Đurdevac, [grafokom@kc.htnet.hr](mailto:grafokom@kc.htnet.hr)

**Anonctarifo** 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR) 1/2 paĝo 500 kn (68 EUR), lasta kovrilpaĝo 2.500 kn (328 EUR). **Abono:** 4 numeroj jare 40 kn (9,5 EUR), unuopa numero 10 kn (1,5 EUR)

**La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.**

# ESPERANTO EN KROATAJ AMASKOMUNIKILOJ

Kroata Esperanto-Ligo notis specialan intereson de publikaj informiloj pri Esperanto en decembro 2006 kaj januaro kaj februaro 2007.

Esperanta grupo de Elementa lernejo Retkovec sukcesis organizi 6 TV elsendojn pri internacia kuirado inspirita per Esperantaj spertoj en Infankongreseto en Prato. En kelkaj el tiuj elsendoj la infanoj havis okazon informi per Esperanto. Kiel ni informis en la decembra numero de *Tempo*, unu el etaj kuiristoj Ernesto Rey Hudeček portis ĉapelon kun Esperantaj vortoj "Esperantista kuirejo". La infanoj kuiris ankaŭ bengale por omaĝi al la bengala eldono de *Hlapić*.

Unu el decembraj elsendoj de TV-programo *Kiel fariĝi milionulo* havis demandojn lige al profesio de Zamenhof. La publiko klopodis helpi al la konkursinto asertante ke Zamenhof rilatas al lingvistiko (39 % de la publiko voĉdonis por lingvistiko). La konkuranto por la premio respondis erare, malobservis la sugestojn de la publiko kaj malgajnis premion de 32.000,00 kunaĵoj.

Zamenhof-Tago 2006 okazinta la 6-an de decembro 2006 en Europa domo provokis intereson de *Kroata radio*, Tria programo, kiu dediĉis grandan elsendon al la temo de Esperanto (kun D-ro Velimir Piškorec pri Mavro Špicar, Vida Jerman kaj Spomenka Štimec.) La unuhora elsendo okazis la 10-an de februaro.

La 29-an de decembro 2006 d-ro Ivo Borovečki gastis ĉe TV en Istrio en la programo de *TV Nova*, per longa programo pri sia eventoriĉa vivo en kiu Esperanto havas tre signifan lokon. La programo ampleksis 70 minutojn, la duono rilatis al Esperanto. La elsendo estis ripetita tagmeze la 31-an de decembro 2006.

La infana grupo de Elementa lernejo Retkovec havis la okazon denove unike aperi en TV. Post debutado pri internacia kuirado talentita lernantino Tena Kuzmanović havis la okazon krei 7-eran TV serion pri Esperanto. Tio estis la pinto en la historio de informado pri Esperanto en Kroatio. En tiu serio la 12-jara Tena instruis Esperantan gramatikon kaj klarigis Esperantajn fenomenojn. La elsendojn okazis kadre de la programo *"Bonan matenon, Kroatio"*. La unua programero startis la 5-an de januaro, kiu anoncis la eventon. La 8-an de januaro komenciĝis la lecionoj kaj la 15-an de januaro TV finis la serion premiinte unu el la multaj spektantoj kiuj telefonis al TV. Tena instruis Esperanton en diversaj lokoj en Esperanto-Klubo, en sia hejmo, en teatro de aktorino Vida Jerman kaj en Zamenhof-Strato. Ĵurnalistino Danijela Kokanović dum la elsendodaŭro mem fariĝis lernantino de Tena kaj kun Tena gvidis la kurson. La informmaterialo prezentita ĉiutage daŭris ĉ. 3 minutojn. La spektantoj havis dum du tagoj la okazon telefoni al la telefonnumero de Kroata Esperanto-Ligo por anonci sin por Esperanto-kurso. Tiel kreiĝis tri kursoj, unu kun lernantoj el elementaj lernejoj, kiun gvidas studento David Rey Hudeček. La dua kurso proponas kurson al la triaĝaj

sinjorinoj, (instruas Spomenka Štimec.) La trian kurson por etaj infanoj, kiun komencis gvidi Tihomir Lovrić daŭrigas gvidi Zlata Nanić.

Dum la daŭro de la elsendo la spektantoj telefonintaj al la TV-redakcio ricevis kelkajn Esperanto-lernilojn kaj vortarojn.

La informa valoro de tiu TV-serio estis ekstreme granda.

Dum daŭris tiu serio en *HRT* alia TV stacio *RTL* elsendis kadre de programo "Eksplozivo" la 9-an de januaro pri planlingvoj kaj ilia sukceso. Temis pri Esperanto, iuj aliaj planlingvoj kaj la klingola (la lingvo de klongoloj el filmserio "Stelvojoj"). Pri Esperanto parolis kaj en ĝi kantis Neven Pufnik.

Esperanto reaperis en la elsendo *"Kiel fariĝi milionulo"*, kie gastis membro de Esperanto-Societo Bude Borjan Ante Biluš. Li profitis la okazon du fojojn informi pri Esperanto la 8-an kaj la 11-an de februaro 2007 dum li gastis en la kvizo. Plurcentmila spektantaro aŭdis liajn opiniojn pri Esperanto kaj la paco.

Ne mankis informoj pri ni en gazetoj: *Glas Slavonije* publikigis la 10-an de januaro 2007 pri Libroekspozicio en Esperanto kaj pri nova adreso de esperantistoj. *Podravski list* de la 5-an de februaro publikigis artikolon kun la titolo "Loĝantoj de Đurđevac volas Esperanto-Klubon".

Gazeto *Novi list* el Rijeka publikigis la 19-an de februaro 2007 pri Festivalo de mallonga filmo en Triesto - kie esperantistoj el Rijeka estis membroj de ĵurio kaj la 16-an de februaro pemiis per la unua premio la filmon "Emocij" de Alberto Gossi.

Esperanto Maskerada Kompanio Pašdroć estis la teksto sur unu el la karnavalaj ĉaroj en la granda Karnavalo de Rijeka. Damir Morankić kaj lia 50-membra teamo vestis sin fabele kiel "Katoj en botoj" kaj abunde informis pri Esperanto por 150.000 spektantoj observantaj la karnavalanojn. La foto de Esperanto-katoj aperis en *Novi list* la 19-an de februaro.

Ne malpli gravas pri informado ke katalogo de *Monda ekspozicio de etaj ceramikoj* en Zagreb mendis Esperanto-tradukon de enkonduko, verkita de Tonko Maroević.

La lastan horon de februaro plenigis Vida Jerman. Ŝi gastis la 28-an de februaro de la 23-a ĝis la 24-a horo en Kanzona programo de *Kroata Radio*, Dua programo parolinte pri Esperanto kaj kantinte sep kanzonojn...

Tagĵurnalo de la korea urbo Pusan publikigis ampleksan intervjuon kun Spomenka Štimec pri verkado en Esperanto la 24-an de februaro 2007. La intervjuon kun fotoj prizorgis korea tradukisto Jang Jeong-Ryeol kiu adaptis lernolibron pri Esperanto laŭ la Zagreba Metodo al la korea.

La publiko daŭre ripetas: kial vi ne informas pli pri Esperanto?

S. Štimec



**Maldekstre:** Ĵurnalistino Danijela Kokanović kun Tena Kuzmanović kaj Vida Jerman dum TV-filmado.

**Dekstre:** Lernantoj de Esperanto kun kursgviganto David Rey Hudeček.







# CENTJARA JUBILEO DE FONDIĜO DE UNUA ESPERANTO-SOCIETO EN KROATIO

Antaŭ cent jaroj la 28an de Septembro 1907 jestis en Rijeka fondita la unua Esperanta organizo. Tio estis komenco de organizita Esperanto-movado en Kroatio. "Novi list", kroata ĵurnalo aperinta en Rijeka, la 3an de oktobro 1907 pri fondiĝo de Esperanta asocio skribis jenon:

"Konstituiĝo de la esperantista grupo: Esperantista asembleo okazinta pasintan sabaton (28-09-1907 rimarko en 2007) estis multnombre vizitita. Barono L. Orczi, malfermis la asambleon per unu esperantisma parolado, kio montris bonegan impreson. Fondiĝis "Adriatika Ligo Esperantista" kies tasko devas esti, disvastigadi la internacian lingvon Esperanto en landoj apud Adriatika Maro. La unua sukceso estis ke estas samtempe fondita sekcio "Fiumana Esperantista Grupo", kaj kies tasko estas agadi en Rijeka kaj la ĉirkaŭaĵo. En estraron por "Adriatika Ligo Esperantista" estis elektitaj: Barono L. Orczi, kiel prezidanto; inĝeniero E. Mihić, kiel sekretario; Rikard Rack, kasisto, dum estraro de "Fiumana Esperantista Grupo" konsistis de s-roj E. Springhet kiel komisiito, B. Gilić kiel sekretario A. Schnetz kiel kasisto kaj S. Schlemer kiel bibliotekisto. Monata kotizo estas 80 fil. Kaj dum aliĝo oni pagas 2 K. Kiu deziras aliĝi kiel membro povas sendi simplan poŝtkarton al sinjoro Rudolf Gilić, Via della Riva 2, aŭ kontakti membrojn de la estraro kiuj portas internacian esperantistan insignon (verdan kvinpintan stelon)."

En arkivoj troviĝas fotokopioj de dokumentoj de polico kaj urbestro per kiuj oni ricevis rajton registriĝi. Ankaŭ estas konataj nomoj kaj adresoj de ĉiuj 37 tiamaj membroj de la organizo. Pri dokumentoj trovitaj ni devas danki al nia forpasinta membro Radoslav Škalamera kiu faris grandegan laboron pri esplorado de nia historio kaj sukcesis trovi tiujn dokumentojn.

Esperanto-Societo en Rijeka kaj kroataj esperantistoj tiun ĉi jaron celebros per diversaj aktivecoj la 100-jaran jubileon de la komenco de nia organizita movado.

Triesta Esperanto-Asocio celebris cenjarigon pasintjare. Tiuokaze, por celebri ambaŭ jubileojn Triesta Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Societo Rijeka ĝemeliĝis la 17an de decembro 2006 kiam estis subskribita "Ĉarto de ĝemeliĝo". Per la ĝemeliĝo la triesta asocio finis kaj la societo el Rijeka komencis la celebradon de la jubileo.

La ĉefa "Akademio" okazos la 17an de novembro ĉi-jare en Hrvatski kulturni dom en Rijeka. La solena programo en Rijeka estos samtempe ĉefa jara renkontiĝo de kroataj esperantistoj. Dum la akademio oni prezentos muzikan programon kaj la elstaraj kroataj kaj eksterlandaj artistoj estas jam invitatitaj partopreni en la solenaĵo.

Dum monato novembro estos organizota ankaŭ ekspozicio de Esperantaj libroj en la urba biblioteko de Rijeka. Samtempe okazos prelegoj pri Esperantaj kulturo, literaturo kaj lingvo.

La urbo Rijeka ekstraktis peton de esperantistoj el Rijeka nomi unu straton en Rijeka "Ulica esperanta" (Esperanto-strato). Se la decido de la urbo Rijeka estos pozitiva oni celebros la jubileon per tiu ĉi okazaĵo. Niaj legantoj estos informitaj pri aliaj programeroj de la solenaĵo.

Malgraŭ grandaj taskoj ĉi-jare por esperantistoj en Rijeka, "Konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj kaj mezaj lernejoj" okazos de la 25a ĝis la 27a de majo, kaj la preparlaboroj normale progresas.

V. M.

## Vodnikova (marto 2007)

223. Sava Matetić-Lučić	25,00 eŭrojn
224. Aleksije Herić	3,00 eŭrojn
225. Jadranka Farszky	6,80 eŭrojn
226. Filip Farszky	6,80 eŭrojn
227. Kaja Farszky	6,80 eŭrojn
228. Ida Farszky	6,80 eŭrojn
229. Zlatko Farszky	6,80 eŭrojn
230. Josip Vrančić	13,61 eŭrojn
231. Ute Karlavaris Bremer	2,71 eŭrojn
232. Josipa Katunar	9,50 eŭrojn
233. Kikushima Kazuko - Krizantemo	303,98 eŭrojn
234. Vesna Staničić-Burchards	47,49 eŭrojn
235. Damir Mikulić	
anstataŭ floroj sur la tombo de Jadranka Radunković	124,83 eŭrojn
236. KEL anstataŭ floroj sur la tombo de Tajana Ĉirić	10,00 eŭrojn
237. Vinko Milinković	13,63 eŭrojn

De januaro kolektite 587,75 eŭrojn

Entute 13.842,46 eŭrojn

## HLAPIĆ EN VJETNAMIO

S-ro Nguyen Xuan Thu estis unu el la partoprenintoj de Universala Kongreso de Esperanto en Florenco veninta el Vjetnamio. Inter multaj diversaj kulturaj interŝanĝoj okazintaj dum UK okazis ankaŭ transdono de kroataj Esperantaj libroj al la vjetnamaj manoj.

Nguyen Xuan Thu forportis *Mirindajn aventurojn de metilernanto Hlapić* de Ivana Brlić-Mažuranić al Vjetnamio. En Hanojo, gastiganto de la Internacia Junulara Kongreso en 2007 okazas diversaj aktivecoj lige al Esperanto. Unu el ili rilatis al *Hlapić*. Dank' al la fervora agado de Nguyen Xuan Thu la kroata libro fariĝis programero de vjetnama Semajno de Internacia Amikeco, kutime festata de esperantistoj februarfine. Por la Semajno estis prezentita la vjetnama *Hlapić*. En la laboro pri vjetnamigo el Esperanta libro partoprenis la tuta kvinmembra teamo: la enkondukajn ĉapitrojn vjetnamigis veterano konata sub sia pseŭdonimo Verda Petalo kaj kuntradukis Luong Ngoc Bao. Lingve korektis Nguyen Xuan Thu. Komputile la tradukon aranĝis The Minh kaj redaktis Le Cao Truong. La ĉeestintoj de la festo okaze de semajno de Internacia Amikeco povis vidi la manuskripton. Nun estas serĉata vjetnama eldonisto.

Dankon al vjetnamaj geamikoj pro ilia unika kontribuo al Semajno de Internacia Amikeco.

S. Štimec



## LETERO AL IAMAJ SEK-anoj

Karaj geamikoj, esperantistoj kaj iamaj SEK-anoj!

Ĉu vi scias ke nia Studenta Esperanto-Klubo (SEK) en la jaro 2007 festos siajn 50 jarojn? Jam kvindek jaroj vivas la klubo kies parto estis ankaŭ multaj el vi. Diversspeca estis la klubo vivo (kaj ankoraŭ estas): kursoj, prelegoj, festoj, ekskursoj, eksterlandaj gastoj, internaciaj renkontiĝoj...

Ni planas kelkajn rilatajn aktivecojn. Ĉefa el ili estos solena vespero kun prezento de libreto pri 50 jaroj de SEK, en decembro de tiu ĉi jaro.

Por plenumi tion, ni bezonos pli da financaj rimedoj ol kutime disponeblas en SEK. Pro tio ni petas vin subteni la klubon almenaŭ per membro-kotizo. La kotizo estas 50 kn, sed vi mem elektu la sumon kiun vi volas donaci.

Por esti informita pri la aktivecoj, vizitu nian ret-paĝon, aŭ kontaktu nin persone (ĉiuvendrede vespere en la klubejo), telefone (091-588-3832) aŭ retroŝte (info@sek.hr).

Antaŭdankon por via ebla helpo!

Prezidanto de SEK - Dag Treer

## STUDENTA ESPERANTO-KLUBO PREPARAS SIAN 50-AN JUBILEON

Mea Bombardelli transprenis la taskon kolekti kaj kunordigi la informojn pri la 50-a jara laboro de SEK. Necesas profundaj esploroj de la arkivo por eltrovi informojn. Zlatko Tišljar kaj Spomenka Štimec preparis la tekston pri la agado en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj. Pri la fondo de la klubo kaj enkonduka jardeko estis petita artikolo de la unua prezidanto Vjekoslav Morankić.

Bedaŭrinde Urba oficejo por klerigo, kulturo kaj sporto rifuzis la peton de SEK financi la eldonon de la memorlibro pri SEK en 2007. Same ĝi rifuzis financi iun ajn programeron de SEK en 2007. Tial la prezidanto de SEK Dag Treer kaj Tina Tišljar vizitis Urban oficejon pri klerigo, kulturo kaj sporto. Ili estis akceptitaj de vicestrino Božica Šimleša la 13-an de marto 2007 kaj ricevis konsilon reverki la peton kun pli da detaloj. Nun SEK atendas la decidon pri la subteno.

### Supraj fotoj:

- 1) Sur la titolpaĝo de Esperanto-Revuo: SEK-anoj helpas kunteksti la bunton de la kovrilpaĝo.
- 2) Prezidanto de SEK Dag Treer alportas lumon al la 50-a jubileo.

### Malsupra foto:

Tina Tišljar gvidas kurson en SEK.



## ESPERANTO-GRUPO ĈE KARNAVALO EN RIJEKA

La karnavalo en Rijeka estas unu el la plej konataj en Kroatio kaj Eŭropo. Ĝi okazas kutime ĉiujare meze de monato februaro. Ĉi-jare en maskerada parado de maskiĝintaj grupoj partoprenis pli ol 9.000 partoprenantoj. La parado de maskoj daŭris pli ol 6 horojn. Samkiel ĉiujare dum karnavalo la paradon spektis ĉirkaŭ 150.000 spektantoj. Esperanto-Societo Rijeka havis sian grupon nomita "Kato en botoj" kiu nombris ĉirkaŭ 50 maskojn kaj havis alegorian veturilon. La nomo de la grupo "Esperanto-Maskerada Kompanio Paždroc" estis klare videbla sub la veturilo kaj la grupo per Esperanta anoco estis menciita je ĉiu kontrol-punkto por publiko kaj same oni menciis kaj komentis Esperantan grupon dum televida elsendo. Esperanto societo Rijeka partoprenos la karnevalan paradon ankaŭ sekvtjare. Al Karnavalo de Rijeka estas ankaŭ akceptataj grupoj el aliaj urboj kaj ankaŭ el eksterlando. Ĉiuj interesuloj por partepreni la paradon sekvtjare kontaktu Esperanto-Societon Rijeka (esperanto.rijeka@ri.htnet.hr) kaj oni ricevos informojn kiun kontakti por detalaj informoj kaj aliĝkondiĉoj.

V.M.

Paždroc estas loka dialekta nomo por tohuabohuo.



## RENKONTIĜO DE ESPERANTLINGVAJ VERKISTOJ

Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj okazos ankaŭ en 2007 de la 20 ĝis la 22-a de julio en la bieno de Spomenka Štimec en Hraščina-Trgovišće. La ĉefa gasto estos Tomasz Chmielik el Pollando kiu por la aranĝo preparas Esperantan eldonon de „Mediterrana breviero“ de Predrag Matvejević. Kroataj esperantistoj estas bonvenaj al la sabata renkontiĝo kun la tradukisto kaj eldonisto Tomasz Chmielik la 21-an de julio 2007. La aliaj gastantaj ne ankoraŭ konfirmis sian alvenon. Verkistino Anna Löwenstein ne povas gasti pro la samtempa partopreno en Hanojo.

## ESPERANTA AŬTO-AKIDENTO ĈE JASKA

Survoje al Miro Jelkovic, prezidanto de Esperanto-Societo „Viktor Mihovilić“ el Karlovac okazis aŭtoakcidento la 25-an de februaro 2007 en kiu vundiĝis kunvojaĝantoj Zlatko Tišljar-Pajo kaj Ana Galeković. Pajo kuŝas dum semajnoj kun elartikigita koksosto en hospitalo en Zagreb kaj Ana estas flegata hejme post kelktaga restado en la hospitalo. Pro vundita spino ŝi ricevis metalan veŝton. La ŝoforino Ruža Tišljar ne estis vundita. Al ĉiuj ni deziras rapidan resaniĝon.



## ESPERANTO EN SISAK

Srećko Radulović (sur la supra foto) organizis Inician Komitaton por refondiĝo de Esperanto-Societo en Sisak. Helpas al li kanzonisto de Sisak Govanni Furlan. Spomenka Štimec prelegis pri Esperanto en Gimnazio Sisak la 22-an de marto 2007. La unuaj gimnazianoj anonciĝis por la komencanta kurso.

Mali rječnik važnih riječi  
za kultiviranje srca i duha

HRVATSKI	ESPERANTO
mir	paco
tolerancija	toleremo
dostojanstvo	digno
sloboda	libero
odgovornost	respondeco
istinitost	vereco
ustrajnost	obstino
humanost	humaneco

Sva ljudska bića  
raduju se jednaka  
u dostojanstvu  
i pravima...

Ĉi ti Opće deklaracije o pravima čovjeka

ODBOR  
ZA  
LJUDSKA  
PRAVA

Ivana Banjavčića 7, 47000 Karlovac, Croatia  
Tel: +385 47 600 634, +385 47 600 635  
Tel/fax: +385 47 616 365  
E-mail: chr-ka@ka.t-com.hr • Web: www.ljudskaprava.hr

## ESPERANTO EN KARLOVAC

Ĝia vortaro de gravaj vortoj por kultivado de la koro kaj la spirito. Paco, toleremo, digno, libero, respondeco, vereco, obstino kaj humaneco estas la Esperantaj vortoj kiuj ornamas la etan poŝkalendaron el Karlovac. Apud la koncertaj kroataj vortoj paralele estis presitaj la Esperantaj tradukoj de la esprimoj. Eldonisto estas Komitato por homaj rajtoj el Karlovac.

## NUNTEMPA LINGVISTIKO – SUVREMENA LINGVISTIKA


Prestiĝa kroata lingvistika revuo *Nuntempa lingvistiko/ Suvermena lingvistika* en sia dua volumo de la jaro 2006 (vidu la dekstran bildon), aperanta de 1962, donis atenton al Esperanto dank' al serioza artikolo de D-ro Velimir Piškorec kiu recenzis verkon de Detlev Blanke. Pri la aŭtoro Detlev Blanke kaj pri lia monografio „*Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*“ eldonita de Sabine Fiedler en Frankfurt am Main ĉe Peter Lang en 2006, recenzis Piškorec doninte signifan spacon al la temoj „Kio estas interlingvistiko?“, „La latina kiel inspiro“, „Kiel fariĝas planlingvo?“, „Interlingvistiko kiel Ĉindrulino“. La artikolo prezentas informojn pri pluraj historie gravaj interlingvistoj el la ĝermanaj lingvoregionoj. „Pri vortoj kaj vortaroj“ kaj „Pri tradukoj“ estas pliaj du ĉapitroj en la artikolo kiu sur 10 paĝoj kroatlingve traktas la gravan laboron de Detlev Blanke.

## KOSTRENA INVITAS AL “POKALO KOSTRENA”

La 25-27-a de majo estas la tagoj de *Pokalo Kostrena* kiam en Kostrena siajn sciojn pri Esperanto komparas lernantoj el elementaj lernejoj kaj ricevas *Pokalon Kostrena* kiel premion. Jen lernantoj (sur malsupra foto) el Zagreb prepariĝas por la gaja marborda evento.



Sed ankaŭ instruistoj prepariĝas (vidu malsupran foton). La 10-an de marto kunsidis kroataj instruistoj de Esperanto en Zagreb kaj traktis la statuton de la nova faka asocio pri Esperanto en Kroatio, la kroata ILEI-sekcio. La asocio planas en proksima tempo akiri juran personecon.



## BENGALA TRADUKO DE HLAPIĆ LANĈITA EN KOLKATO

Ni festis la lanĉon de la bengala *Hlapić* vespere de la 23a de februaro 2007 en la aŭditorio de la Nehru muzeo en Kolkato. La redaktoro s-ro Dattagupto kun liaj aliaj kolegoj el la eldonejo de la bengala *Hlapić*, la instituto de Samatat, ni kaj pli ol 100 homoj ĉeestis tie.

Unue, geknaboj kantis du kantojn de R. Tagore. Post la bonvena parolado de la prezidanto de Samatat s-ro Subhransu Ghosh prelegis s-ro Jyotibhushan Chaki.

Poste s-ro Dasgupta prelegis pri la verkistino Ivana Brlić-Mažuranić kaj la lingvo Esperanto. Mi parolis pri la tradukisto s-ro Dasgupta.

Poste li legis parton el la Esperanta *Hlapić* kaj mi legis la saman parton el la bengala *Hlapić*. Poste la kroata ambasadoro s-ro Dino Debeljuh salutis la ĉeestintojn kaj komencis sian prelegon kun la bengala vorto "bondhugon", kiu signifas "amikoj". Li diris, ke li estis tre feliĉa pri la okazo kaj la nova rilato inter du lingvoj. Li ankaŭ memoris pri la aŭtorino kaj menciis, ke ŝi kutime verkis por sia infanoj. Do ŝiaj noveloj venis el la profunda koro, do legantoj tre ŝatas ilin ĉiam.

Inter la paroladoj s-ro Dasgupta mallonge raportis en la angla linvo pri la programoj.

La programo de la lanĉo de la bengala *Hlapić* finiĝis kun teo kaj manĝeto.

Mina Dan


Fotis Arun Gupta (fotoj 1-3)

La bengala traduko de *Hlapić* estis parto de la ĉi-jara Monda Tago de la Gepatra Lingvo kiun ni en Zagrebo festis per muzika programo de Setsuko Shimizu en Esperanto-Societo "Bude Borjan" la 21-an de februaro 2007. La 22-an de februaro 2007 en Gradska knjižnica Velika Gorica Kroata Esperanto-Ligo prezentis la bengalan *Hlapić*. Pri la bengala lingvo parolis Ivan Andrijanić, voĉlegis en la bengala Sulekha Polak kaj en Esperanto Dan Āković. Sulekha kuiris por ni bengalan manĝon "alukablio" kiu gustis brile!

S.Š.



**Sur la fotoj:** 1), 2) Kroata ambasadoro Dino Debeljuh tenas en la mano la bengalan eldonon 3) S-ro Dasgupta prelegas pri Ivana Brlić-Mažuranić. 4) Alukablio en Velika Gorica gustas brile. 5) Prezento de la bengala *Hlapić* en Velika Grica: Katja Markotić, (direktorino de la biblioteko), Dan Āković kiu legis Esperante, Ivan Andrijanić kiu parolis pri la bengala kaj Shuleka Pollak kiu legis bengale.






# LA OSIJEKA KVIPO EL 1889 - LA UNUJ ESPERANTISTOJ EN KROATIO

Esperanto-societo "Liberiga Stelo" Osijek nun (marto 2007) agas por nomi unu straton en Osijek "Esperanta strato". Kompreneble, oni utiligos maksimume la fakton, ke 5 osijekanoj antaŭ 120 jaroj estis pioniroj de la esperanta movado en Kroatio! Kaj la nun proponata strato estas tute proksime al iliaj loĝlokoj. Sed pri kiaj pioniroj temas? Sekvas la klarigo.

Zamenhof publikigis Esperanton en 1887 kaj en ĉiu ekzemplero de Unua Libro de Esperanto estis 8 kartetoj kun jena teksto: "Mi subskribinto, promesas ellerni la proponitan de D-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson".

Ĉu li kredis je tiuj milionoj, ĉu tio estis reklama truko - ne gravas. Gravas, ke al tio multaj homoj reagis resendinte sian nomon kaj adreson. Dank' al tio li kompilis adresarojn de personoj kiuj lernis Esperanton. La karteto pruvas, ke iu persono almenaŭ iom konatiĝis kun la lingvo, eĉ se tiu ne vere ellernis ĝin. Ni povas tiujn personojn nomi "la unuaj esperantistoj".



**Dekstre:** Represo de nomoj kaj adresoj de la osijeka kvinopo el la Zamenhofa adresaro.

**Maldekstre:** Titolpaĝo de la unua adresaro, en kiu estis menciita la osijeka kvinopo.

La unua adresaro, aperinta en 1889, estas aparte interesa por esperantistoj en nia lando. Inter 1.000 personoj troviĝas 5 nomoj el Kroatio (tiam parto de Aŭstro-Hungario). Ĉiuj 5 personoj estis junulinoj el la urbo Osijek. Ni konsideru la fakton, ke la organizita movado en Kroatio komenciĝis nur 20 jarojn poste, en 1907 (la klubo en Rijeka) aŭ en 1908 (la nacia organizo en Zagreb)! Ene de tiuj 20 jaroj aperis nur unu artileria oficiro (Egon Moše) ĉ. 1897, kaj ankaŭ li estis el Osijek!

La osijekano kvinopon malkovris ŝajne neniu kroata esperantisto tiutempe. Eĉ la pola esperantisto Adam Zakrzewski en 1913 en la libro "Historio de Esperanto 1887-1912" skribis, ke en Kroatio estis 5 esperantistoj, sed lian informon neniu priatentis. Nur en 1978 serbia esperantisto Boriša Milićević publike prezentis tiun fakton. La fakto estis tiom pli grava, ke tio estis unuaj esperantistoj eĉ en tiama Jugoslavio!

Post tio la osijeka profesoro Antun Šimunić esploris la aferon detale, kun valora helpo de pluraj osijekaj esperantistoj, inter kiuj oni nepre devas menci i s-ron Aleksandar (Saša) Kocian. Šimunić publikigis en 1983 la libron "Obstine antaŭen - materialoj por historio de la esperanta movado en Osijek"

(kroatlingve). La komencajn paĝojn li dediĉis al la kvinopo. Sed lia esplorado iris plu, kaj en 1984 li publikigis novan verkon "Novaj perspektivoj", kie li prezentis multajn novajn faktojn pri la kvinopo.

Bedaŭrinde, krom kelkaj esperantistoj el Osijek, malmultaj homoj interesiĝis pri tio, kaj sekve post 15 jaroj eĉ gvidantaj esperantistoj en Kroatio ne sciis pri tiu historio. La libro "Obstine antaŭen" kuŝadis en osijeka klubo, kaj la libro "Novaj perspektivoj" ŝajnas esti iom fantoma, ĉar ne estas konate, kiu ĝin havas hodiaŭ, krom la s-ro Pleadin el Durdevac.

Kontraŭ tia ĝenerala "dormado" mi batalas per mia lastatempa esploro pri la kvinopo. Post tiu ĉi artikolo en "Tempo" espereble sekvos pluraj novaj faktoj en Interreto kaj en memstara broŝuro.

*Hergovic, Natalija.* Esseg (Osiek doljnji-grad), Cvietkova ulica, N. 50. R.  
*Heršenjinger, A.* Łosicy, gub. Siedlec. R.  
*Herzmann, Ch.* Rossieny, gub. Kovno. R.  
*Hildenbrand, Johann.* Vilno, Kancelaria General-Gubernatora. R.  
*Hinchliff, James A.* Liverpool, International Patent Office. An.  
*Hirszowski, Władysław.* Przedeecz, tra la stacio Kłodawa. R.  
*Hohejsel, P. U.* Taganrog, Azovsko-Donski Komerĉ. bank. R.  
*Honigberg, A.* ) Verbovetz, gub Podolsk. R.  
*Honigberg, W.* )  
*Hradil, Anna.* )  
*Hradil, Emmy.* ) Esseg Unterstadt, Florianigasse 35. A. H.  
*Hradil, Gusti.* )

*Pillepich, Maria Magd.* Esseg, Unterstadt, Kirchengasse 21. A. H.

Jen la kvinopo, kun iliaj numeroj:

342.	Natalija HERGOVIĆ	(Cvietkova ulica 50)
351.	Anna HRADIL	(Floriangasse 35)
352.	Emmy HRADIL	(la sama adreso)
353.	Gusti HRADIL	(la sama adreso)
689.	Marija Magd. PILLEPICH	(Kirchengasse 21)

La germana "Floriangasse" egalas al la kroata "Cvietkova ulica", t.e. "Florian-strato", kaj "Kirchengasse" al la kroata "Crkvena ulica", t.e. "Preĝejo strato". La samaj stratoj, kun la samaj nomoj, ekzistas eĉ hodiaŭ en la Malsupra Urbo (Donji grad), parto de Osijek.

La numeroj uzataj en zamenhofaj adresaroj indikas, laŭ Boris Kolker, nur ilian alfabetan lokon en koncerna adresaro. En la unua adresaro la numeroj eĉ mankas. Zamenhof tion elpensis nur poste, por faciligi kontaktojn inter esperantistoj. Do, kelkaj anoj de la unua adresaro mem kalkulis sian numeron, kaj la samon faris postaj esplorantoj.

Šimunić skribis, ke la landonomo (mallongigita) ĉe tiuj 5 personoj estis erare skribita "Rusio", anstataŭ Aŭstro-Hungario aŭ Kroatio, kaj pro tio laŭdire neniu rimarkis la nomojn. Sed mi kontrolis la liston, kaj vidis, ke nur ĉe unu junulino tio okazis. La aliaj kvar estis enskribitaj regule. Do ni ne plu disvastigu la miton. Prefere KEL finfine akiru fotokopion el la viena Esperanto-muzeo de la tuta adresaro, kaj iu tralegu ĝin pli atente! Eble eĉ aperos ia nova surprizo!

Tiom pri la adresaro. Kio pri la resenditaj kartetoj? Herbert Maier el la muzeo skribis al mi, ke en Vieno ili tion ne havas, kaj ke li estas preskaŭ tute certa, ke la plenigitaj zamenhofaj kartetoj ne plu ekzistas.

Nun sekvas la historio pri la kvinopo, kiun mi legis en la sekvaj fontoj: la du menciitaj verkoj de Šimunić, la teksto



en "Osječki zbornik 27" de Ljerka Perči pri la osijeka familio Munk (eldonis la Muzeo de Slavonio en Osijek), oficialaj libroj pri naskiĝoj, geedziĝoj kaj mortoj en Osijek el la 19a jarcento, datumoj en osijekaj tombejoj kaj diversaj fontoj en Interreto.

Jen la historio, en formo de rakonto:

En la jaro 1826 en Ĉeĥio naskiĝis Carolus Hradil. Tia estas lia nomo latinlingve en osijekaj dokumentoj, sed la vera nomo devus esti Karel. Li estis oficisto sur vaporŝipoj, kaj pro sia laboro li alvenis iun tagon al Osijek. Osijek estis tiam vigla kozmopolita urbo, en kiu loĝis krom kroatoj ankaŭkonsiderinda kvanto da serboj, germanoj, hungaroj kaj aliaj nacioj de la aŭstria imperio. Tie li edziĝis al Maria Fiedler kaj restis en tiu urbo. Kun ŝi li havis 5 filinojn: Ana (1865-1948), Hermina (1866-1872), Augusta (1868-1947), Maria (1870-?) kaj Emma (1871-?). Lia edzino mortis pro ftizo fine de 1871, kaj la filino Hermina en 1872 pro iaspeca angino. Sed la bofratino Adalberta (Berta), kiu estis baptopatrino de ĉiuj 5 filinoj, baldaŭ edziniĝis al Karel, kaj fine de 1873 naskiĝis la filo Carolus (poste kroate Dragutin).

Sed la patro Karel mortis jam en 1874 pro peritonea inflamo.

Ni ne povas eĉ imagi, en kia malriĉo vivis la juna vidvino, post nur unu jaro da geedzeco kun 5 etaj infanoj, kiun verŝajne neniu plu edzinigus. Kaj ŝi mem mortis pro ftizo kiel la fratino, sed post 12 jaroj, en 1886. La familio ĝis tiam loĝis en pluraj lokoj en la osijeka Tvrda, kaj la infanoj estis bonaj lernantoj. Sed poste ili translokiĝis al Malsupra Urbo. Kiu zorgis pri la infanoj? Kaj unu jaron poste Zamenhof publikigis Esperanton. Post 2 jaroj aperis la Adresaro, en kiu estis Ana, Augusta kaj Emma, same kiel Maria Pillepich kaj Natalija Hergović. Ĉiuj 3 adresoj estas tre proksime. Laŭ hodiaŭaj domnumeroj la distanco estis 50 metrojn kaj 200 metrojn. Kaj verŝajne la junulinoj agis en konsento.

Sed kiuj estis Marija Pilepić kaj Natalija Hergović?

Ŝimunić kontaktis parencojn de Natalija, kaj trovis ke ŝi estis instruistino en Osijek, judino, gepatre ŝi parolis hungare, kaj konis la lingvojn ĉeĥan, kroatan kaj eble rusan. Ŝi eĉ tradukadis iom el la ĉeĥa en la vilaĝo Dežanovac apud Daruvar. Ŝi havis muzikan talenton kaj estis membro de la osijeka muzika societo "Kuhac". La parencoj ŝin memoras kiel virinon kun forta sento pri la justeco kaj pri la amo al homoj. En 1917 ŝi organizis foriron de osijekaj membrinoj de Ruĝa Kruco al la rusa fronto. Ŝi ne edziniĝis, kaj vivis proksimume inter 1860 kaj 1930. Ŝi kun siaj fratoj propravole ŝanĝis familian nomon de Wolf al Hergović.

Kaj Marija Pillepich kaj ŝia familio?

Jen ilia historio. En 1834 naskiĝis en Sv. Josip apud Rijeka Eduard Pilepić. Tie oni tute normale uzis krom la kroata ankaŭ italan formon de propraj nomoj, kaj oficiale ankaŭ la germanan. Sekve li estis jen Eduard jen Eduardo, jen Pilepić, jen Pillepich. Li fariĝis ŝipkapitano. Li ŝajnas esti klera homo, ĉar en 1862 la aŭstria kompanio Lloyd publikigis fakan tekston el 16 paĝoj de certa Pillepich Eduardo, kiu estis notita interrete fare de itaj fervojistoj en Bibliografia Ferroviaria Italiana ("Riflessioni sul completamento delle ferrovie nell'impero d'Austria..."). Temas pri proponoj por evoluo de aŭstria fervojlinioj. Ankoraŭ estas serĉata definitiva pruvo, ke temas pri la sama Eduardo.

Li edziĝis al Terezija Frollo naskite en Venecio, kaj inter 1870 kaj 1874 li postenas en Budapeŝto, Turnu Severin, Tótfalu kaj aliaj lokoj, kiuj evidente rilatas al la rivero Danubo. Liaj 3 filoj kaj 1 filino naskiĝas en tiuj jaroj en diversaj urboj. Marija naskiĝis en 1871 en Tótfalu en Hungario. Kiam la familio venis al Osijek, ni ne scias, sed en 1889 ili estis tie laŭ la adresaro. Kocian trovis en tiama osijeka germanlingva gazeto "Die Drau" raporton pri muzika kaj teatra aranĝo en osijeka kazino en 1890, kie ludis pianon Marija Pilepić kaj aktorin inter aliaj Emma Hradil. Ankoraŭ en 1897 ŝi enskribis en memorlibron de Adela Munk sian nomon "Marija Pilepić", do ŝi ankoraŭ vivis en Osijek, kaj ankoraŭ ne edziniĝis. Kio okazis

poste al ŝi, ni ne scias, sed ŝia frato Hinko vivis en Sarajevo kaj havis infanojn tie.

Eduard Pilepić mortis en Osijek en 1898, kaj lia tombo ankoraŭ (2007) ekzistas en la tombejo de Malsupra Urbo. La paliĝinta germanlingva teksto, kiu optimisme finiĝas per "Ĝis revido!", montras, ke neniu el la familio estas entombigita tie kun li, sed estas membroj de iu hodiaŭa familio el Rijeka. Mi eksciis telefone, ke tiuj rijekanoj heredis la tomblokon de siaj antaŭuloj, kiuj zorgis pri certa maljuna filo de Eduard, kiu vivis preskaŭ 100 jarojn (ĉ. 1970), kaj estas entombigita ĉe Opatija. Laŭdire tiu filo (kaj frato de Marija?) havas propran filinon en Germanio, kun kiu li ĉesigis ĉiujn rilatojn. Mi donis taskon al rijekaaj esperantistoj, ke ili trovu pri kiu homo temas. Ni vidos ĉu tio estas bona spuro por esplori la vivon de la familio Pilepić. Sed jam nun evidente estas, ke ili ĉiuj ĉesis esti osijekanoj tre frue.

Ne havante ankoraŭ sufiĉajn informojn pri la familioj Hergović kaj Pilepić, mi pli profunde esploris la familion Hradil.

Pri Emma Hradil estas nur iomete da informoj pri la kultura aranĝo de Pilepić kaj en lernejoj ekzamenaj dokumentoj (trovis Kocian). Kio okazis poste, oni ne scias.

La filo Carolus Hradil (1873-?) frekventis la osijekan realan gimnazion, laboris en la osijeka sukerfabriko, kaj poste kiel arbarista konsilisto en Novska kaj Zagreb. El malklaraj informoj ŝajnas, ke li edziĝis dufoje. En la arbarista gazeto "Šumarski list" inter 1931 kaj 1940 aperis ĉ. 15 liaj artikoloj, ĉefe nekrologoj. Lia nomo estas tie kroata Dragutin Hradil.

Sed hodiaŭ en datumbazo de telefonoj en Kroatio troviĝas eĉ ne unu nomo Hradil aŭ simila. Kaj en osijekaj tombejoj (kaj ties komputiloj) ankaŭ neniu tombo. Do malgraŭ la multaj idoj de Karel, lia familia nomo en Kroatio ne saviĝis. En Ĉeĥio ŝi estas ofta hodiaŭ.

Augusta Hradil (1868 Osijek-1947) edziniĝis en 1893 al Antun Dierich (germane Anton) kaj havis filon, kiun nomiĝis Aleksandar. Li naskiĝis en Zemun en 1903, kaj sekve ankaŭ Augusta ne longe restis osijekano. Ŝajne la filo estis profesia soldato. Li neniam edziĝis, kaj li malaperis en la milito en 1942 batalinte kontraŭ partizanoj. Ekzistas foto el 1911 sur kiu estas Ana kaj Augusta Hradil (20 jarojn post la adresaro), kun iuj familianoj.

La tombo de Augusta kaj Antun Dierich ekzistas en la komputilo de la tombejo "Anino groblje" en Osijek. Mi trovis la lokon, sed tie estis tabulo kun alia nomo (ankaŭ en la komputilo), el kio estas klare, ke la restaĵojn de la geedzoj Dierich la tombeja estraro forigis. Tio okazas se almenaŭ 30




Foto el la libro "Novaj perspektivoj" de Antun Ŝimunić, Osijek, 1984. [AŝN] Ŝimunić diras, ke la foto estas el 1911, kaj sidas maldekstre Ana (Hradil) Krvarić, kaj dekstre Augusta (Hradil) Dierich, kun la familio. Ĉu maldekstre staras la 18-jara Kamilo Krvarić? Ĉu Viktor apude? Ne estas klare, de kie Ŝimunić havis la foton. La originala foto perdiĝis. Estas preskaŭ certe, ke kun la familio Perči li ne kontaktis.

jarojn neniu zorgas nek pagas tenado de la tombo.

Pri la geedzoj Dierich tamen jen unu gaja informo! Laŭ la listo de volapukistoj el 1888 ("Volapük-Almanach für 1888 verfasst von Sigmund Spielmann", eldonis Eduard Heinrich Mayer, Leipzig, 16 Rossplatz) estis en 1888 en Aŭstro-Hungario 50 diplomitaj instruistoj de Volapuko, inter kiuj estas "Dierich Anton, Essegg". Essegg estas germana nomo de Osijek. Mankas fina pruvo, sed sendube la esperanta pionirino havis fervoran volapukan edzon! Ŝerco: ĉu pro tio ili ne havis infanojn dum 10 jaroj?

Plej multe da informoj konserviĝis pri la vivo de Ana Hradil kaj ŝia filo Kamilo. Ankoraŭ mi atendas informojn pri ili, kaj certe mi tiujn informojn iam havos.



En la oficiala libro de naskiĝintoj de romkatolika parokejo Donji Grad en Osijek, ni vidas ke en 1866. naskiĝis Ana Hradil.

Ana Hradil naskiĝis la 19an de januaro 1865 en Osijek. En la lernojaro 1877-78 ŝi frekventis la kvaran klason de elementa lernejo, kaj la instruistino estis Silvija Gregurić. Inter 1878 kaj 1881 ŝi frekventis la osijekan realan gimnazion. Kio poste? Kiu zorgis pri ŝi kaj pri la gefratoj, krom la stifpatrino (kaj onklino) Berta? En 1889 ŝi vivis en Malsupra Urbo kaj aperis en la adresaro. En 1890 ŝi edziniĝis al Viktor Krvarić, kiu, kvankam osijekano, jam vivis kaj laboris en Sarajevo. Bosnio tiutempe estis freŝe okupita de Aŭstro-Hungario, kaj li laboris kiel ŝtata oficisto en la landa registaro de Bosnio. La filo Kamilo naskiĝis en 1894 en Sarajevo. En 1921 (jam en Jugoslavio) Viktor emeritiĝis en Sarajevo. Proksimume tiam Kamilo jam vivis en Osijek kun sia edzino Emilija Munk (geedziĝintaj la 14an de februaro 1917), en la domo en Franjina 5 (hodiaŭ Zadarska 5). Ne estas klare, ĉu Ana kaj Viktor Krvarić vivis plu en Sarajevo, aŭ ili revenis al Osijek. Sed Ana mortis en Osijek en 1948, kaj Viktor (kie?) en 1927.

En la sama osijeka domo kun Kamilo kaj Emilija vivis ankaŭ 2 fratinoj de Emilija: Adela kaj Hermina. Adela ni menciis pro ŝia memolibro kun subskribo de Marija Pilepić. Ĉiuj 3 fratinoj estis bonegaj muzikistoj, same kiel Kamilo. Hermina instruis pianon al multegaj osijekanoj, ludis kaj komponis, sed poste en socialisma Jugoslavio oni intence silentis pri ŝi. Kamilo kaj la edzino kaj la bofratinoj ofte koncertis hejme, altkvalite, kaj ankaŭ publike. Emilija filmadis multajn kulturajn aranĝojn en kaj ekster Osijek.

Pri Emilija skribas la magazino "Hrvatica - časopis za ženu i dom" ("Kroatino - magazino por virino kaj hejmo"), numero 7 julio 1939, donante ŝian foton kaj laŭdante ŝiajn multajn artajn talentojn. Ŝi estis vicprezidanto de la nacia-kleriga societo "Hrvatska Žena" (Kroata Virino). Dum pluraj jaroj Emilija (same ŝia familio) partoprenis en operaj kaj operetaj prezentaĵoj de la teatro... ktp.

Kamilo tre aktivis en la osijeka muzika societo "Kuhac", estis direktoro de la osijeka urba presejo kaj de la osijeka gazeto "Hrvatski list", aktivis muzikante kaj organize en la muzika societo "Kuhac" kaj en Osijeka Filharmonio. Li estis ankaŭ pentristo.

En 1941 venis la Dua mondomilito, Kamilo estis politike aktiva kaj tre elstara en kroata naciisma movado ("ustaša") kaj antaŭ la komenco de la milito li pro tio estis eĉ en malliberejo en Zagreb. En Osijek li aktivis en la nova reĝimo de NDH (Sendependa Ŝtato Kroatio), kiel altranga oficisto en Osijek ("stožernik"). Tiu provo post 900 jaroj de revivigo de kroata sendependa ŝtato malsukcesis, ĉar la ŝtato fondiĝis

helpo de nazia Germanio, kaj post ties malvenko, la aliancanoj ne rekonis NDH, sed Jugoslavion. Kamilo kun Emilija devis elmigri al Argentino, sed Hermina kaj Adela restis en Osijek, en Zadarska 5, kun maljuna Ana Krvarić (la patrino de Kamilo). Kamilo fariĝis redaktisto de kroata magazino "Hrvatska" en Buenos Aires. Li mortis en Argentino en Villa Ballester en 1958, kaj Emilija en 1976.



Kamilo Krvarić ludas violonon kun la fratinoj Munk.

Ana Krvarić mortis en Osijek en 1948 (Zadarska 5) pro pneŭmonio, sed ŝian tombon mi ne trovis. Eble en Sarajevo? Tio restas por esti esplorata. Adela en 1958 suferis pro apopleksio kaj restis malsana tre longe. Hermina korespondadis kun Emilija ofte kaj ĝis ties morto (1976), kaj mem mortis en 1977 en Osijek. La tombon de Adela kaj Hermina mi vidis.

La domo en Zadarska 5 heredis aŭ aĉetis la familio Perĉi, kies membro Ljerka Perĉi el Varaždin posedas unu leteron de Emilija al Ana Krvarić, kaj 70 leterojn de Emilija al Hermina, kaj aliajn materialojn. Mi esperas post certa tempo ekscii multe pli pri la familio Munk, kaj el tio kristaliĝos valoraj informoj pri Ana Hradil.

Oni povas ludi, divenante de kie venis la Unua libro al la kvinopo.

La unua impresado diras, ke la komenco devas esti ĉe la tri fratinoj. Ili simple estas la plej multaj. Sed tio povas esti ankaŭ trompo: se iu najbarino varbis unu fratinton, facile estas varbi pliajn. Ekzemple Marija Pilepić havis artan talenton, kaj kun sia patro vidis multajn landojn antaŭ ol veni al Osijek. La patro, estante kapitano, certe vojaĝis multe eĉ poste. Sed ni ne forgesu la informon de Ŝimunić, ke Emilija Munk estis esperantistino. De kie tiu informo? Se ĝi estas vera, eble Ana estis la plej fervora el la kvinopo, sekve ankaŭ la unua? Ankaŭ por Natalija estas argumentoj: ŝia kono de pluraj lingvoj, sed ankaŭ ŝia juda deveno. Konsideru, ke Zamenhof publikigis la Unuan libron en nemultaj ekzempleroj kaj sen serioza reklamo. Ĉu ne estis por li konsilinde disvastigi la libron laŭeble multe per diversaj judaj societoj kaj konatoj?

Mi daŭrigos mian esploralaboron, kiom ajn mi povos.

Mi prezentos la aferojn, kiaj ili estas. Male al Ŝimunić, kiu silentis pri maloportuna politika agado de Kamilo. Eĉ se montriĝos poste, ke la kvinopo nur ŝercis pri Esperanto, aŭ ke ili poste havis malfavoran opinion, aŭ faris poste ion malbonan en la vivo, mi ĉion skribos, fotos, komentos kaj indikos la fonton.

Bedaŭrinde, Ŝimunić ne skribis pri siaj fontoj, kaj eventualaj materialoj ne saviĝis, aŭ perdiĝis. Estas (malgranda) ebleco, ke mi iom trovos poste. Jes, mi havas Interreton kaj retpoŝton. Sed li havis la plej valoran aferon el ĉiuj: tempon - pasis ja preskaŭ 25 jaroj depost lia laboro, kaj multaj homoj mortis aŭ perdis la memoron aŭ la paperojn. Sed ankoraŭ povas vivi iu memoranta avino, aŭ ŝi konservis valorajn fotojn kaj leterojn. Sekve: "Obstine antaŭen!"

Davor Klobučar, Osijek



## NI INSTRUAS EN KLUBOJ KAJ LERNEJOJ

### KLUBOJ

#### *Esperanto Societo Rijeka*

Kurso por 4 komencantoj kaj progresiga kurso por 6 kursanoj.  
Instruas: Josipa Katunar

Du komencantoj en du apartaj kursoj.  
Instruas: Vjekoslav Morankić

#### *Esperanto-Societo "Bude Borjan"*

Kurso por 6 komencantoj de TV-kurso.  
Instruas: Spomenka Štimec

Kurso por 6 komencantoj de TV-kurso.  
Instruas: David Rey Hudeček

Kurso por du komencantoj  
Instruas: Darko Blažić (2 komencantoj)

#### *Studenta Esperanto-Klubo Zagreb*

Kurso por 5 komencantoj  
Instruas: Tina Tišljar

#### *Esperanto-Societo Split*

Instruas: Vukašin Dimitrijević

#### *Hejmo por emerituloj Vinkovci*

Instruas: Aleksije Herić

#### *Privata hejmo en Dubrava*

Kurso por du komencantoj  
Instruas: Zlata Nanić

Preparata kurso en *Esperanto-Societo „Liberiga Stelo“* en Osijek

Instruas: Višnja Branković

### LERNEJOJ

#### *Zagreb: Elementa lernejo Retkovec*

Kurso por 4 komencantoj kaj kvar progresintoj

Instruas: Judita Rey Hudeček

#### *Zagreb: Elementa lernejo "Mladost"*

Kurso por 5 komencantoj kaj 5 progresintoj.  
Instruas: Marija Jerković

#### *Velika Gorica: Elementa lernejo de Juraj Habdelić*

Kurso por 10 komencantoj.  
Instruas: Mila Bečka

#### *Sveti križ Začretje: Elementa lernejo*

Kurso por 3 komencantoj kaj 2 progresintoj.  
Instruas: Tihomir Lovrić

#### *Nova Gradiška: Gimnazio*

Instruas: Manda Bunjevac.

## REAGO

pri la teksto *SEK havos 50 jarojn en 2007* aperinta en "Tempo", septembro, n-ro 3/2006, paĝo 5

Dum aliaj nacioj mondvaste prezentas kiel eble pli intense la historie eventojn, tute malas inter kroatoj esperantistoj. Laŭ multaj, la historio de Esperant(ism)o en Kroatio komenciĝis en kaj ekzistas nur post la jaro 1945! Tio videblis el la enkondukita teksto pri historio de Esperanto en Kroatio, aperinta en la Kongresa libro de la 7-a kongreso de kroataj esperantistoj (2005). Nun temas pri anonciata jubileo de studentoj – iam nomitaj akademiuloj. Jam pli frue ekzistis la sama situacio rilate la komencon de Esperanto inter kroataj fervojistoj! Mi demandas: "Kio sekvos?". Ĉu ni forviŝu ĉion ekde "Spelin" de Juraj Bauer, trans la unuaj esperantistoj el la jaro 1891 en Osijek ĝis la parolado de Tomislav Maretić ĉe la kunsido de Kroata akademio de sciencoj kaj arto en la jaro 1891 pri artefaritaj lingvoj, inter kiu estis speciale akcentita Esperanto? Ni menciuj ankaŭ kontinuecon de esperantismo per dummilita kunveno de esperantistoj-partizanoj en Livno en la jaro 1943 far' Ivo Lapenna. Jen la kerna historia vero: la 18-an de novembro 1909 estis fondita Kroata akademio esperantista (naciolinguve: Klub hrvatskih akademičara esperantista), kiu pli poste ŝanĝis la nomon al Kroata Akademio Esperantista Societo (naciolinguve: Hrvatsko akademsko esperantsko društvo). Jam en pasintjaraj numeroj de "Tempo" mi intenscis skribi pri du "ŝtupoj" nepriskribitaj: Zagreba Esperanto-Ligo (ZEL) kaj ĝia gazeto "Zelano" kaj Kroata Esperantista Unuiĝo kaj ĝia gazeto "Kroata esperantisto". "Zelano" aperadis en 1987-1992! Eĉ ne unu alineo skribita pri Kroata esperantista unuiĝo, nek pri reapero de "Kroata esperantisto". Pri ZEL kaj "Zelano" oni devis skribi almenaŭ, ke ĝi estis fondita la 4-an de novembro 1981. Eble ankaŭ, ke post la jaro 1987 ĝi realigis multajn novajn ideojn: (1) honordiplomon por elstaraj esperantistoj, esperanto simpatiantoj kaj societoj, (2) gazeton "Zelano", (3) Etlibran serion, tn. ETLIB, (4) literaturan konkurson "Ivo Rotkvić" ktp. ZEL starigis tabulon sur la domo en la Placo de reĝo Tomislav n-ro 21, okaze la okdekjarigo de la unua n-ro de "Kroata esperantisto" kaj organizis karavanon de esperantistoj al Bolonjo okaze de la honorigo de ZEL pro la kunlaboro kun bolonjaj esperantistoj.

Nu, certe hundo ne bojas nur pro vilaĝo, sed ...

*Radenko Milošević*

## OMAĜE

### Tajana Ĉirić nask. Kovačević

Ŝi mortis en Pataya en Tajlando la 12-an de decembro 2006. Ŝi naskiĝis en Zagrebo la 12-an de decembro 1977 kaj lernis Esperanton en Studenta Esperanto-Klubo. Ŝi partoprenis en UK en Tel-Avivo. Tajana helpis kiel teknika redaktoro ĉe la kreo de la libro *Kroataj poetoj*.



### Mladen Kitonić (1935-2007)

Li naskiĝis en Durđevac en la jaro 1935, kiel unua infano de ardaĝ geesperantistoj Ivan kaj Marija Kitonić. Samkiel poste naskiĝintaj liaj du fratinoj, li estis denaska esperantisto. Li finis maŝinteknikan mezlernejon kaj laboris diversloke en Kroatio kaj Germanio. Li mortis pro kancero en Zagrebo la 8-an de marto 2007 kaj estis kremaciita en la zagreba krematorio. Pli detale pri lia familio ni skribis en Tempo n-ro 3/2005, paĝo 6.

# KALENDARO DE KONGRESOJ KAJ KONFERENCIOJ VIZITINDAJ EN 2007

Kontaktadreso de Kroata Esperanto-Ligo (KEL): Kneza Mislava 11, 10000 ZAGREB, Tel: ++385(0) 1 4617550, Faksilo: ++385(0)1 461 9373, [esperanto@zg.t-com.hr](mailto:esperanto@zg.t-com.hr)  
[www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr)



## 5a – 10a de aprilo - Lignano Sabbiadoro, Italio

31a Internacia Junulara Festivalo.

Temo: "120 jaroj de Esperanto".  
Kontaktadreso: [nicola.ruggiero@esperanto.it](mailto:nicola.ruggiero@esperanto.it)  
<http://iej.esperanto.it/ijf/>

## 25a – 30a de aprilo - Triesto, Italio

*Karstaj tagoj en Triesto.*

Esplorado de subtera mondo kaj ekskursoj.  
Kontaktadreso: Triesta E-Asocio, CP 601, IT-34100 Trieste-Centro, [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it)

## 11a – 13a de majo - Andrejev dom na Slemenu, Slovenio

5a Familia MKR (MontKabana Renkontiĝo).

Kontaktadreso: [vanja.radovanovic@ericsson.com](mailto:vanja.radovanovic@ericsson.com)  
<http://www.keja.hr/mkr-familia-n.html>

## 12a – 19a de majo - Parizo, Francio

59a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF).

Kontaktadreso: Kroata Fervojista Esperanto-Asocio, Mihanovićeveva 12, 10000 ZAGREB  
[zlatko.hinst@hznet.hr](mailto:zlatko.hinst@hznet.hr)

## 25a -27a de majo - Kostrena kaj Rijeka

Kroata konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj kaj mezaj lernejoj kaj Internacia Junulara Renkontiĝo.

Kontaktadresoj: Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, 10000 ZAGREB, Tel: 01 461 7550, Faksilo: 01 4619373,  
rete: [esperanto@zg.htnet.hr](mailto:esperanto@zg.htnet.hr) kaj [esperanto.rijeka@ri.htnet.hr](mailto:esperanto.rijeka@ri.htnet.hr)

## 26a de majo - Hraščina-Trgovišće (Bieno de Spomenka Štivec)

Meteorita festo: gastas kroata verkisto Igor Mandić  
Kontaktadreso ĉe KEL

## 20a – 22a de julio - Hraščina-Trgovišće (Bieno de Spomenka Štivec)

4a Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj.

Ĉefa prezento de la programo sabaton, la 21an de julio.  
Kontaktadreso ĉe KEL.



## 21a – 28a de julio - Pelplin, Pollando

18a Ekumena Esperanto-Kongreso, 60a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj 57a Kongreso de KELI.

Informoj: Kozyra Eduard, PL-83-130 Pelplin, Strzelnica 8, rete: [esperanto@powiat.malbork.pl](mailto:esperanto@powiat.malbork.pl)

## 21a – 28a de julio - Antony (apud Parizo)

80-a SAT-Kongreso

Informoj: Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 av. Gambetta, FR-75020 PARIS, tel.: +33(0)1 4797 8705; fakso: +...4797 7190, rete: [vinkomarkov@yahoo.fr](mailto:vinkomarkov@yahoo.fr)



## 28a de julio - 4a de agosto - Maribor, Slovenio

7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio.

Kontaktadreso: Esperanto-Societo Maribor, Maistrova 5, SI-2000 MARIBOR, Slovenio.  
Rete: [eeu.kongreso@gmail.com](mailto:eeu.kongreso@gmail.com)

## 28a de julio - 3a de aŭgusto - Hanojo, Vjetnamio

Internacia Junulara kongreso

Temo: Paco, kunlaboro kaj disvolviĝo.

Informoj: [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org); [ijk@tejo.org](mailto:ijk@tejo.org)



## 4a – 11a de aŭgusto - Jokohama, Japanio

92-a Universala Kongreso de Esperanto.

Preparata karavano de kroataj esperantistoj.  
Kontaktadreso ĉe KEL

## 11a – 19a de aŭgusto - Ranzan, Japanio

40-a Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

Informoj: [rete: isksanjo@ff.e-mansion.com](mailto:rete:isksanjo@ff.e-mansion.com)  
aŭ ĉe KEL.



## 20a – 27a de aŭgusto - Albena, Bulgario

73a Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj

Informoj ĉe: Antun Kovač, telefono (hejme): 01 3822 682, poŝtelefono: 098 993 5712

## 27a – 30 de septembro - Beli (insulo Krk), Kroatio

18 MKR (MontKabana renkontiĝo)

Kontakto: [vanja.radovanovic@ericsson.com](mailto:vanja.radovanovic@ericsson.com)  
retpagxo: <http://www.keja.hr/mkr-familia-n.html>



## 17a de novembro 2007 - Rijeka

Jara renkontiĝo de kroataj esperantistoj okaze de celebros de 100a datreveno de fondiĝo de unua asocio esperantista en Rijeka kaj Kroatio.

Solena arta programo sabton la 17-an de novembro en Hrvatski kulturni dom (Kroata Kulturdomo) en Rijeka.

Kontaktadreso ĉe KEL au ĉe Esperanto-Societo Rijeka, Blaža Polića 2, 51000 Rijeka, Telefono/faks: 051 228148  
rete: [esperanto.rijeka@ri.htnet.hr](mailto:esperanto.rijeka@ri.htnet.hr)

En la mondo en 2007 okazos pli ol 160 kongresoj, konferencoj kaj renkontiĝoj kie sola laborlingvo estas Esperanto. Plena kalendaro de Esperanto-aranĝoj en 2007 videblas ĉe retpaĝo: <http://www.eventoj.hu>.